

TEA-BULTENO

20^A JARO

SEPTEMBRO - OKTOBRO

N. 10-11/2017

Raraj estas tiuj kiuj uzas la menson, malmultaj kiuj uzas la koron, unikaj kiuj uzas ambaŭ.
Rita Levi Montalcini (1909-2012)

En oktobro - Seminario pri Internacia Komunikado en TEA



Subtene de la Centro pri Volontula Servo FVG

Docentoj - Referantoj

Prof. Davide Astori – Universitato de Parma
Manuela Olivo – Fakulo pri teknikoj rilataj al lernado, memorigado, rapidlegado. Responsulo de la triesta sekcio "Geniulo en 21 tagoj".

Elda Doerfler – Instruistino pri la internacia lingvo Esperanto.

Alberto Vitale – Instruisto pri la internacia lingvo Esperanto kaj Sekretario de la Itala Esperantista Junularo, kun kelkaj siaj kunlaborantoj.

La temoj

1. Eŭropo kaj lingvoj – la lingvoj en Eŭropo kaj la socio-lingva problemaro de la kontinento.
2. En serĉado de la perfekta lingvo – jam de la 16^a jarcento, kleruloj rezonadis pri serĉado de komunaj lingvoj, eĉ planitaj.
3. Ludoviko Lazaro Zamenhof kaj la esperantistaj idealoj – prezento de la lingva projekto, sed antaŭ ĉio de la kultura projekto, kiu enestas en la esperantista propono.
4. Interkultura kaj interreligia dialogo. Religioj kaj kulturoj interparolas: de Noa ĝis L. L. Zamenhof.
5. Kiel lerni rapide lingvon.
6. Esperanto: malnova revo aŭ juna lingvo?
7. Baza rapidkurso de la internacia lingvo Esperanto.

Per tiu ĉi Seminario oni intencas alfronti la internacian interkomunikadan problemon, startante per taksado de la aktuala situacio, de la diversaj provoj kaj diskutoj tra la historia disvolviĝo, por trovi konforman solvon de tiu ĉi bezono, ĝis alveno al la lingva projekto de Ludoviko Lazaro Zamenhof. Krome oni ekzamenos la eblojn proprigi al si specifajn rapidlernajn lingvo-teknikojn.

Al tiu ĉi kleriga kaj eduka parto, aldoniĝos baza intensiva rapidkurso pri la internacia lingvo

Esperanto, je kies finiĝo oni donos la eblon praktiki kiom oni lernis.

La Seminario estas senpage malfermita al ĉiuj kaj konsistas en serio da renkontiĝoj en oktobro 2017, po 3-5 horoj tage, konsidere tamen la bezonojn de la partoprenantoj.

Seminaria labor-plano - 1^a sesio De vendredo la 13^a ĝis sabato la 14^a de oktobro 2017

Edvige ACKERMANN kaj Elda DOERFLER:
Enkondukaj vortoj.

Vendrede (h. 16.30 / 19.30):

Prof. Davide ASTORI pritraktos la punktojn 1. kaj 2.

Sabate (h. 10.00 / 13.00):

Prof. Davide ASTORI pritraktos la punktojn 3. kaj 4.

Intervenoj de la partoprenantoj.

2^a sesio

De vendredo la 20^a ĝis sabato la 21^a de oktobro 2017

Vendrede (h. 16.30 / 19.30):

Alberto VITALI kaj kunlaborantoj:

1. Prelego pri "Esperanto: malnova revo aŭ nova lingvo?"

2. Rapidkurso pri Esperanto.

Sabate (h. 10.00 / 13.00):

1. Rapidkurso pri Esperanto.

Intervenoj de la partoprenantoj.

3^a sesio

Marde la 24^{an} de oktobro (h. 17.30/19.00)

Manuela OLIVO parolos pri la punkto 5.

Elda DOERFLER:

Pliprofundigo de kelkaj bazaj reguloj de la internacia lingvo Esperanto.

Vendrede la 27^{an} de oktobro (h. 7.00/19.00)

Prof. Davide ASTORI:

Pliprofundigo de kelkaj aspektoj de la internacia lingvo, testoj pri legado kaj komprenado.


Edvige ACKERMANN kaj Elda DOERFLER:

Konkludoj kaj debato pri la Seminario.

Laste trovitaj!

Kiu serĉas, tiu trovas! Tio ĉi estas mia devizo, kaj fojfoje miaj insistemo kaj persistemo estas premiitaj.

Tuthazarde, antaŭ kelkaj tagoj, mi ekvidis en reta aŭkcio bildkarton de nia LLZ. *Ho, kiel strange, neniam mi vidis ion similan!* Jam aŭdeblas via morkommento. Tute ne ironiu pri ĉi tio: ja ĉiu esperantisto konscias, ke la tuta Esperantujo estas inundata de miloj da Z-portretaj kartoj, sed tiu ĉi estis vere speciala, neniam antaŭe vidita. Nu, la startpropono estis bagatela: mi provu! Gajnita, pagita kaj ... atendota! Feliĉe ĝi ne perdiĝis kaj baldaŭ trovis la vojon al mia poŝtokesto kaj... jen agrabla surprizo sur la dorsa flanko: la karto estis subskribita de Edmond Privat kaj sendita al la kroata esperantisto Bude Borjan, la 10^{an} de decembro 1937!



Ĉiuj certe tre bone konas la svisan esperantiston, doktoron pri historio, universitatan profesoron, verkiston, ĵurnaliston. Interalie li postenis ĉe UEA kiel ĉefredaktisto de la revuo *Esperanto* kaj ankaŭ kiel ĝia prezidanto; organizis internaciajn konferencojn (en Venecio-1923, pri Komerco kaj Turismo; en Ĝenovo-1924, pri Radio; en Prago-1927, pri Paco en lernejo...) kaj, en Laŭzano-1931, eĉ prelegon de Gandhi, kun kiu li amikiĝis kaj iris al Hindujo, kie li restadis plurajn monatojn. Unu el liaj multaj meritoj estis la enkonduko de esperantlingvaj elsendoj ĉe la Svisa Mallongonda Radio (poste nomita *Svisa Radio Internacia*) ekde 1946.

Per tiu karto li bondeziris sukcesan Zamenhofan Vesperon al S-ro Bude Borjan kaj al la Zagreba grupo.


Sed kiu estis Bude Borjan? Naskiĝinta en Kričke (1904), li studis en Split kaj Zagrebo (ĉe Agronomia Fakultato). En 1923 li ekaktivis politike en la Akademia Klubo *Galilej* kaj en Klubo de studentoj marksistaj. Pro tio li havis problemojn en ricevo de laborposteno. Pro politika agado ofte li estis arestita, laste en 1941 antaŭ la okupado de la lando, kiam li estis

sendita al malliberejo Lepoglava. Eklerninte Esperanton en Split (1922), li iĝis elstara esperantisto: en Zagrebo B. Borjan aktivis en la Akademia Esperanto-Klubo. Li membris en la redakta komitato de *La Suda Stelo*, sur kiu li aperigis siajn ideologiajn verkojn. Julie 1941, viktimo de la ustaŝa reĝimo, li estis pafmortigita en Zagrebo.

Nun ni rigardu la LLZ-bildon.



Ĉe la maldekstra angulo, legeblas la inicialoj: MC. Tio tiklis mian sci-volemon kaj, je pli atenta esploro de la dorsa flanko, evidentiĝis, ke la nomo de la aŭtoro estas: Manuel Cabanas. Tie estis skribita la jeno: "Gravuro el ligno de Manuel Cabanas - Eldonis Esperanta-Rondeto *La Vekiĝo* - Barreiro, Portugalujo".



L. L. ZAMENHOF

Autoro de Esperanto (1859-1917)

Denove la sama dilemo: kiu estis tiu gravuristo kaj kiun rilaton li havis kun Esperanto?

Manuel dos Santos Cabanas, portugalo, naskiĝis en *Vila Nova de Cacela*, je la 1902^a jaro, kaj mortis en *Fero*, 1995. Junule li eklaboris en la fervojoj de *Barreiro*. Li engaĝiĝis en la lukto kontraŭ la diktatoreco de la portugala prezidanto Antonio Salazar, kunfondis en la 1930^{aj} jaroj la Socialisman Partion kaj multon agadis favore al la laboristaro, por starigo de taŭgaj socialaj kaj sanaj servoj.

En 1938, li komencis sian aktivadon en la arta sektoro, dediĉante sin precipe al lignogravurado. Interkonatiĝinte kaj amikiĝinte kun multaj artistoj, li intense desegnadis kaj skulptadis: jam en 1939 okazis liaj unuaj ekspozicioj, dum kiuj li gajnis plurajn premiojn kaj eĉ la oran medalon de Belaj Artoj. Li ankaŭ en politika kampo estis tre aktiva, iĝante ankaŭ deputito de la Socialisma Partio. Estante 70-jara, li laboris kiel Redakcia Direktoro de la *Revuo de la Popoloj*.

Multajn honorigojn M. Cabanas ricevis de la Ŝtato, ekde la 1980^{aj} jaroj, el kiuj menciindas la Granda Kruco de Ordeno de Libereco, de la *Infante D. Henrique* kaj la bronza busto kiu estis starigita (1993) en lia naskiĝurbo, pro volo de la prezidanto Mário Soares.

Sed neniu informo pri lia eventuala rilato al Esperanto estis trovita.

Ĉu venontjare, okaze de la 104^a UK en Lisbono, eblos ekscii iom pli? Espereble, ĉu ne?

Fontoj: *EdE*; *Biografia leksikono de kroatiaj esperantistoj*, de Josip Pleadin; *Vikipedio*.

Kiom valoras la homa vivo?

La 4^{an} de aŭgusto, amiko el Germanio mesaĝis pri lastatempa krimaĵo en la nutraĵa sektoro kiu alarmis lian tutan landon. Li parolis pri "venenovoĵoj", sed ne multe li aldonis, sugestante ke tutsimple mi esploru en la reto.

"Strange!" mi pensis. "Pri tio ĉi ĝis nun nenion mi estis leginta sur la tagĵurnalo." Tial mi tuj sekvis lian konsilon kaj ... ek al navigad'!

Dum pluraj tagoj mi kontrolis la pluropiniajn informojn aperantajn tie kaj ĉi tie en retejoj kaj fine mi decidis, ke la temo estas interesa kaj grava ankaŭ por miaj belegantoj. Verŝajne vi konas la temon pli bone ol mi, sed tamen mi ŝatas pritrakti ĝin. La tuta afero ŝajnas instruiga.

Dik- kaj eg-literaj titoloj altiras la atenton ĉe la diversaj retredakcioj.

Milionoj da ovoj infektitaj per Fipronil: alarmo en tuta Eŭropo!*

Interŝanĝo de akuzoj inter Germanio, Nederlando kaj Belgio pro la malfrua diskonigo!!

La insekticido estas "modere danĝera" por la sano: neniu paniku!!!

Ankaŭ en Italio tiuj ovoj estis enportitaj!!!

Konsekvence de tiu ĉi lasta sciigo la itala Ministro pri Sano tuj komunikis al ĵurnaloj kaj televidaj redakcioj jenan kontraŭdiraĵon: "Kelkaj produktoj infektitaj per Fipronil alvenis ankaŭ al Italio, sed ĉiuj estis sekvestritaj kaj tial ili ne kuŝas sur la bretoj de superbazaroj."

Dankon, ja tio estas trankviliga novaĵo por ni italoj, sed kio pri ĉiuj aliaj eŭropanoj, travivantaj nian saman cirkonstancan? Plie, kiu havas la absolutan certecon, ke oni tion asertu por ne alarmi la tutan popolon?

Demandoj kirlis ĥaose en mia

kapo: kiam oni konsciis pri la problemoj kaj de kie venis la unua averto?

La unua *ekkria* atentigo pri ebla danĝero estis lanĉita la 22^{an} de julio fare de la Nederlanda Instanco pri nutrad-sekureco, kiu tutunue subtenis la tezon, ke tute ne ekzistas tuja danĝero por la publika sano. Iom poste, per dua komunikado, oni informis, ke konsumo je grandaj kvantoj da ovoj enhavantaj la insekticidon povus doni nesalubrajn efikojn. Per tria, oni asertis, ke en la ovoj de iu produktanto estis trovita tiom alta koncentriĝo de *fipronil*, ke ties manĝado povus kaŭzi seriozan danĝeron, precipe al infanoj.

Ŝajnas al mi, ke tiu instanco ne havis tre klarajn ideojn pri la malbonefika *fipronil* – ja ili estis ludantaj per riska ilo kun la vivo de eŭropanoj!

* *Fipronil* estas insekticido plejofte uzata de bestokuracistoj por ekstermado de puloj, iksoj, akaroj kaj parazitaj. Ĝia agadkampo estas la nerva sistemo de la mortigenda insekto. Eŭropa Unio malpermesas ĝian utiligon sur bestojn destinotajn al homa nutrado. Kiaj estas la riskoj por la homoj? Laŭ MOS – Monda Organizo pri Sano – la insekticido, en solida stato, estas modere toksa por la homo; eksponado al *fipronil*, en gasa stato, povus kaŭzi naŭzon, vomemon, ventrajn dolorojn. Se ĝi estas konsumata je grandaj kvantoj, ĝi povus damaĝi renojn, hepaton aŭ tiroidon. Sed fakuloj samopinias, ke la riskoj por la sano estas malaltaj, ĉar toksigo okazas nur kiam temas pri altaj dozoj da *fipronil*. Tamen oni priatentu, ĉar la efikoj povus esti pli seriozaj se oni konstante manĝas ovojn aŭ ties ĉi derivaĵojn (dolĉaĵojn, ov-pastaĵojn, majonezon ks) dum ĉirkaŭ semajno aŭ dek tagoj. La malbona efiko povus aperi je pli mallonga tempolimo se temas pri infanoj, maljunuloj aŭ suferantoj je malsanoj rena, tiroida aŭ hepata. Kio tamen iom pli trankviligas, estas la fakto, ke la simptomoj ĉe la nerva sistemo (tremetado de la manoj, iom da dormemo, malalta reagkapablo) malaperas post kelkaj horoj aŭ tagoj, depende de la ingestita kvanto kaj de la sanstato de la ingestanto.

Intertempe en Nederlando 180 bredejoj estis fermitaj. Sed, en la celilo de Germanio, la plej implikita importinto, estas la Belga Agentejo por la nutraĵa sekureco, kiu agnoskis ke la problemoj estis jam konata ekde junio. Ĝi informis tiam la naciajn juĝinstancojn, sed atendis la 20^{an} de julio por komuniki la problemon al la eŭropa sistemo pri rapida alarmo. Kial? Ĉar tiam estis ekita juĝenketo pri fraŭdo. Ĝia sen-



kulpigo estis, ke la situacio varias de lando al lando kaj ke en Belgio "la niveloj de *fipronil* en la ovoj estas sub la sojloj interkonsentitaj je eŭropa nivelo". Responde, Germanio kontestis tiun aserton kaj, el kontroloj aŭtonome faritaj, evidentiĝis, ke male en la ovoj ĉeestis niveloj de insekticido sufiĉe toksaj por la sano de infanoj.

Kia estas aktuale la eŭropa situacio? En Germanion estis importitaj 10 milionoj da ovoj infektitaj, kiuj post la eksplodo de la skandalo, ne plu estis surmerkigitaj.

Nun la ovoj "kulpigitaj" ne plu troveblas nek aĉeteblas en Belgio, Nederlando, Danio, sed intertempe ian kvanton oni certe jam konsumis, kaj krome oni devas pensi pri la derivaĵoj. Ĉu ankaŭ ĉi tiujn oni retiris el la vendejoj?

Tamen, laŭ la Eŭropa Komisiono, ne nur tiuj landoj estis la "nestoj" de la importitaj ovoj, ĉar ili estis entute vendataj al 15 landoj, kiaj Svedio, Irlando, Aŭstrio, Romanio, Slovenio, Italio k.a. Sed - ĝi aldonis - *fipronil* estis "kontraŭleĝe utiligata" de Nederlando, Belgio, Francio kaj Germanio. La itala presagentejo AGI informis intertempe, ke Italio, kiel ankaŭ aliaj landoj, por elimini la iksodojn kaj pulojn de kokinoj, uzas alian insekticidon, la naturan produkton *Dega-16*, faritan el mentolo kaj eŭkalipto. Ĝia uzado estas konsiderata tute sekura por la homo.

Kaj nun? Jam de 3-4 tagoj (NdR: la artikolo finskribitis la 15^{an} de aŭgusto.) neniu plu parolas pri la temo aŭ aperas nur etaj artikoloj, fine de iu paĝo, en angulo. Ĉu ĉio solvita? Forgesita? Sed ni demandu nin, kion ĉi ĉio instruas al ni.

Inter la miloj da problemoj kiuj plinigrigas nian vivon, la "venen-ovoj" fariĝis plia ĉiutaga koŝmaro. Nova problemo ekestas: ĉu ni plu povos manĝi ovoj? Kaj la ov-pastaĵojn?! Kaj tiujn bongustajn dolĉaĵojn, faritajn per ovoj? Ĉu fidine estas, aĉeti tiujn nutraĵojn enhavantajn ovoj? Plie, ĉu niaj infanoj rajtos ricevi la frandajn biskvitojn? Kaj duboj kaj duboj aperas en ĉies menso, kiam oni aĉetadas varojn por pretigado de manĝaĵoj. Ĉu tiu botelo el ekstrapura olivoleo devenanta el Apulio, regiono kie estas kultivataj la plej renomaj olivarboj, vere enhavas puran olivoleon? Ĉu la kokino, kiun mi intencas proponi al miaj familianoj rostitan kun akompano de bongustaj terpomoj, estas "aŭtentika" kokino, laŭregule bredita kaj sen ia ajn malsano (birda gripo?)? Nutrofraŭdoj alvenas el ĉiuj merkatoj.

Ĉifoje temas pri ovoj. Kio plej ekscitas koleron ĉe mi, estas la fakto ke ŝajne jam de preskaŭ unu jaro oni sciis pri tiu ĉi problemo. Kial silenti? Nu, respondi facilas: komerca aktivado, mono, ignorado de la efektiva danĝero, subtaksado de evidentaĵoj... Ĉio tamen kondukas al mono, la diabla sterko, kiu silentigas ĉiujn voĉojn, kiu forgesigas la komunan solidarecon kaj oferas ĝin sur la altaro de la profito.

Oni diras ke *fipronil* ne endanĝerigas la homan vivon, sufiĉas ne alpreni altajn dozojn. Kaj kio okazas al la infanoj? Ĉu ni ne jam ilin infektis sufiĉe per plej diversaj malsanigaj substancoj? Ni nur pensu pri la palma oleo, por ne paroli pri la senfinaj kaj daŭraj poluadoj aeraj, akvaj, grundaj!

Ni demandu nin: kial tia sinteno? Kial permesi la disvastigon de tiu nebonefika substanco ĉeesta en la nutraĵoj? Ĉu pro ekonomio? Ĉu ekonomio pli gravas, ol la homa sano? Atentu: memoru pri la serpento kiu mordas sian voston!

La temo estis pri ovoj, sed kio okazas pri la kokinoj? Oni elmerkatis la ovoj, ĉu ankaŭ

la kokinojn, kiuj estas same venenaj kiel siaj ovoj, aŭ eĉ pli? Ĉu daŭre oni ilin elportadas/-ados? Eble oni transigas ilin al Afriko: Afriko plurfoje fariĝis la rubaĵujo de la okcidentaj landoj. Kial? Ĉu afrikanoj eble estas niaj hamstroj?

Eŭropa Unio: kie ĝi estas? Kian rolon ĝi havas? Ĉu Eŭropo ne estis destinita plifortigi la civilizacion en la mondo? Aŭ ĝi forgesis tion, kaj provas nur ekspluati kiel eble plej?

Kie estas en Eŭropa Unio la respekto de unu ŝtato al alia? Kial EU permesas fraŭdojn nutraĵajn ĉiuspecajn? Komprenoble en ĉi kazo mi parolas pri Italio, ĉar mi konas pli bone tiun ĉi medalflankon. En la mondo cirkuladas italaĵ fromaĝoj falsaj, ne originalaj, kiel la Padvala, tre renoma, aŭ el ŝafa lakto, falsaj olivoleoj, el la suda Italio aŭ Tuskaniaj, k.a., kaj en multaj orienteŭropaj landoj oni vendas proprajn varojn, surmetante etiketon kun la konata kaj alloga surskribo: "Made in Italy".

Tamen ni rigardu la medalon de la alia flanko: lastatempe oni povis legi, ke estis prezentita al la Komisiona Prezidanto, Jean-Claude Juncker, teksto fare de la grupo Visegaard (Pollando, Hungario, Slovakio, Ĉeka Respubliko, kun la apogo de Rumanio, Bulgario kaj Slovenio) en kiu legeblis: "La eŭropa Konsilio akceptas la decidon de la Komisiono, solvi la problemon de la duobla kvalito de manĝaĵoj en la interna merkato". Tiun ĉi frazon la grupo insiste petis, ke ĝi estu aldonita al la finaj konkludoj de la Komisiono: kaj tiel estis. Kion tio signifis? Ke diversaj nutrovaroj, produktitaj de la grandaj konzernoj, liveras al la ŝtatoj de la grupo Visegaard misajn, aĉ-kvalitajn varojn se komparitaj kun tiuj vendataj en la cetera Eŭropo. Oni eĉ ne povas imagi, kiaj estis la respondoj de la grandaj entreprenoj. Mi persone hontas pri jeno, nome esti eŭropano. Nu, ankaŭ en Eŭropo ekzistas unuarangaj kaj duarangaj Ŝtatoj. Fie!!!

Mi finas tie ĉi: listigado de la pluraj problemoj estus senfina kaj ne tre konforma al la modesteco de ĉi Bulteno. Mi certe ne kapablas solvi tiaĵojn, sed mi kredas ke tamen ni ĉiuj, ene de nia mikromondo, havas ian povon: per niaj simplaj ĉiutagaj agoj eblas bojkoti la grandajn, famajn entreprenojn kiuj maletike invadas la mondon per malsanigaj, malkonformaj al la ĝustaj leĝoj pri protektado de la homa sano. Ni ja scias, kiuj tiuj estas: ne aĉetadu iliajn produktojn kaj disvastigu kiel eble plej la informojn pri ilia malhonesto konduto. Kaj ne nur en la nutrad-kampo, sed ankaŭ en aliaj, ekz. tiuj rilataj al merkato de vestoj, ŝuoj, kaj aliaj tiutipaj varoj, kiuj estas faritaj en la tiel dirita 'tria mondo', kie oni ekspluatas sklavece la homojn, precipe virinojn kaj infanojn.

Pripensu, pripensu serioze tion ĉi!

Eldo

TRADUKKONKURSO "LUCIJA BORČIĆ"

Kroata Esperantista Unuiĝo, honore al Lucija Borčić (26.07.1921-14.11.2015), lanĉas literaturan tradukkonkurson de iu ajn nacia lingvo al Esperanto.

La konkursaj branĉoj estas jenaj:

- poezio: maksimuma longo ne fiksita
- prozo - rakonto aŭ novelo: maksimuma longo 30.000 tajperoj (kun spacoj).

La rezultojn oni publike anoncos la 14^{an} de novembro en Zagrebo, okaze de la memorkunveno al Lucija Borčić.

La organizantoj disdonos ĝis po tri premioj branĉe.

La aliro al la konkurso estas libera al ĉiu esperantisto, kiu rajtas partopreni per maksimume tri konkursaĵoj/verkoj kiuj antaŭe ne estis publikigitaj, ĉu en la presa, reta, bloga, fejsbuka formoj.

Al la konkursaĵo oni nepre aldonu la jenajn informojn:

- nomon kaj familian nomon, poŝtan kaj retan adreson de la konkursanto;
- titolon de la originalo, nomon kaj familian nomon kaj la bazajn datumojn de la aŭtoro de la tradukita verko.

La tradukaĵojn kune kun la originalaj tekstoj kaj aldonaj informoj oni sendu al:

hes@hes-keu.hr

ĝis la 30^a de septembro 2017.

La premioj konsistas el diplomo kaj libroj.

La organizantoj de la konkurso prizorgos la presadon de la premiitaj tradukoj konforme al la reguloj preskribitaj por tiu agado (respekto de aŭtoraj rajtoj ktp).

Havano
Kubo



11-17
Februaro
2018

9^a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto

Kongresa Temo - Lingvoj kaj Kulturoj: edukado por daŭripova evoluo en la Amerikoj.

**Havano 2018:
veni, kongresi, amikumi
en tutamerika etoso.**

La 9^a TAKE estas evento kunorganizata de Kuba Esperanto-Asocio kaj de la Amerika Komisiono de Universala Esperanto-Asocio. Ĝi naskiĝis kiel forumo por la regiona agado kaj estas la ĉefa kongreso kiu celas ne nur arigi la esperantistojn de la Amerikoj, sed ankaŭ tiujn el la tuta mondo, dezirantaj iel subteni kaj kunpartopreni regionan agadon.

Havano levas denove la torĉon kaj entuziasme la kubaj esperantistoj laboras por sukcesigi nian regionan kongreson. Ties ĉi ĉefa celo estas plivastigi la kunlaboron inter landaj movadoj de la Amerikoj kaj ankaŭ direkti la atenton al konservado kaj interesiĝo pri Esperanto flanke de grupoj kaj izoluloj en landoj sen organizita strukturo aŭ malforta movado, kiuj bedaŭrinde pluras en nia mondoparto.

Tial Havano invitas ĉiujn veni, kongresi, amikumi kaj kontribui al plifortigo de nia komuna agado, tio estas, disvastigi Esperanton, kunlabori kaj ĝui nian kulturan vivon. Jen nia alvoko al vi! Estu bonvenaj en Havano, la kuba ĉefurbo, venontjaron februaron, sed ankaŭ antaŭ- kaj post-kongrese. Konatiĝu kun la varma koro de la Kuba Esperantujo!

*Maritza Gutiérrez González
Prezidanto de KEA kaj de LKK*

Profesie presitaj libroj jam ekde unu ekzemplero!

La *Eldonejo Libera* kun gvido de Lode Van de Velde eldonas profesie presitajn librojn malalt-kvante, kaj volas doni lokon en sia katalogo al ĉiu, kiu deziras eldoni verkon en Esperanto. Se ankaŭ vi havas manuskripton kaj volas eldoni ĝin libroforme, sendu ĝin al la eldonejo, kiu ofertas ankaŭ tantiemon. Pri la ISBN-numero pretas zorgi la eldonejo.

La libroj estos aĉeteblaj en la retbutiko Amazon, kaj ankaŭ en la retbutiko de la eldonejo, kie troveblas jam dekduo da eldonitaj verkoj, inter ili ekzemple "Baza Kurso pri Fotografio" aŭ "Manĝeblaj sovaĝaj plantoj" ks.

Pli detalaj informoj estas troveblaj ĉe: <http://e-libera.weebly.com>; Fejsbuka paĝo de la eldonejo: <https://www.facebook.com/Eldonejo-Libera-167436763613324>

Noto de Szilvási László - Indas konscii, ke en preskaŭ ĉiuj landoj eldonantoj havas la devon sen-

di kelkajn ekzemplerojn (senpage) al sia Nacia Biblioteko (ekz. en Hungario 6 ekzemplerojn). Tio servas kaj la intereson de la ŝtato, kaj la interesojn de la eldonanto, ja tiel la libroj eniras en la oficialajn datumbazojn, kaj ili estos atingeblaj por esploristoj kaj arkivistoj.

VLADIMIR PUTJIN MENCIIIS ESPERANTON!

La prezidanto de Rusio – kiel neantaŭanoncita honorgasto – la 20^{an} de aŭgusto malfermis la ĉi-jaran sesion de la tradicia internacia ĵaz-festivalo *Koktebel Jazz Party* en Koktebel, artista vilaĝo en Krimeo, kie li diris i.a.: "Muziko - ĝi estas lingvo, jen ĝi estas Esperanto, internacia lingvo, kiu unuigas homojn." En la festivalo *Koktebel Jazz Party* partoprenis 150 konataj ĵaz-kolektivoj el la tuta mondo.

Registraĵo pri Putjin videblas ĉe ru.sputnik.kg/ideo/20170821/1034805478/putin-na-koktebel-jazz-party.html

Fonto: Ret-Info / Lingvo-Studio

Septembra Programo	
15a, vendredo	20h00 - Preparado de la Seminario
21a, ĵaŭdo	17h00 - Konversacia rondo
22a, vendredo	20h00 - Poeziaĵoj italaj kaj esperantaj
29a, vendredo	20h00 - Esperanto-filmoj de UEA
Oktoobra Programo	
5a, ĵaŭdo	17h30 - Konversacia rondo
6a, vendredo	20h00 - Preparado de la Seminario
12a, ĵaŭdo	17h30 - Preparado de la Seminario
13a, vendredo	16h30 - Startas la Seminario
14a sabato	10h00 - Daŭrigo de la Seminario
20a, vendredo	16h00 - Seminario: rapida kurso de Esperanto
21a, sabato	09h00 - Daŭrigo de la rapida kurso
24a, mardo	17h30 - Prelego de Manuela Oliva
27a, vendredo	17h00 - Seminario, lasta pritraktado kaj konkludoj

110 jaroj de Esperanto-Societo Rijeka 1907-2017

28/09 - 15^a horo

-Antaŭ la memortabulo (strato Korzo 18 - Rijeka) memorigo pri la fondintoj de la unua Esperanto-societo en la Rijeka regiono kaj Kroatio.

-Inaŭguro de la ekspozicioj "Filatelo kaj Esperanto" kaj pri artpentraĵoj far amatorinoj el Matulji.

29/09 - 10h00-20h00 - vizito de ekspozicioj.

30/09 - 10h00 ĝis la fino de la solenaĵo - vizito de la ekspozicioj.

Posttagmeza programo **ekde la 15^a horo**:

1. Himnoj kroata kaj esperanta
2. Inaŭgura parolado
3. Kanto: Emanuele Rovere
4. Pri la historio de la Esperanto-Societo Rijeka
5. Virina koruso: Ukraina kantas
6. Disdonado de Dankdiplomoj kaj Honoraj Dankdiplomoj al la membroj de la E-Societo
7. Kanto: Operkantisto el Kroata Popola Teatro Zagreb, Mrzlečki Neven
8. Prezento de Prof. Dr. Jozefo Marević pri lia 8-lingva medicina vortaro
9. Danca kaj folkloro grupo Žejane aktorino (Istroruma lingvo)
10. Dankesprimoj al la ĉeestantoj
11. Eta manĝeto
12. Ĝis la revidoj.

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com

Sidejo/Poŝta adreso: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste

Kunventagoj: ĵaŭde 17-19; vendrede 19-21

Tel: (+39) 392 2860685 - 040 350093; 339 2226936

Banka Konto: Unicredit-IBAN IT 53 U 02008 02242 000102990439

Reto: esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscali.it

Asociaj ttt-ejoj: www.tea1906.altervista.org; www.karstajtagoj.altervista.org

UEA DIPLOMIS 8 ELSTARAJN AGANTOJN

En la Solena Fermo de la 102^a Universala Kongreso en Seulo estis anoncigitaj la nomoj de la 8 ricevantoj de Diplomo pri Elstara Agado kaj pri Elstara Arta Agado. Tiuj diplomoj estas aljuĝataj de la Estraro de UEA ekde la jaro 2007. Jen la ĉi-jaraj distingitoj:

Normand FLEURY (Kanado)

Motora de la kebekia movado dum pli ol tridek jaroj, ĉeforganizanto interalie de la Internacia Junulara Kongreso en 1992 kaj la Tutamerika Kongreso de Esperanto en 2008.

Ronald GLOSSOP (Usono)

Profesoro pri paco-studoj, dum jardekoj aktiva verkisto kaj preleganto pri la rilatoj inter Esperanto, paco kaj internacia kompreniĝo.

Halina KOMAR (Pollando)

Elstara aktivulo pri informado, i.a. kadre de la ekonomiaj pintkunvenoj en Krynica, la muzik-festivalo Woodstock, la pola parlamento kaj medioj de la t.n. Tria Aĝo.

Jonas MARX (arta, Germanio)

Majstro de repa muzika stilo en Esperanto, kies koncertoj entuziasmigas junan kaj ankaŭ ne tiel junan publikon.

Germain PIRLOT (Belgio)

Aktivulo pri instruado dum multaj jaroj, efika helpanto por la instruado de Esperanto en Afriko kaj senlaca kompilanto de registro de Esperanto-kursoj tutmonde.

Jérémie SABIYUMVA (Burundo)

Talenta motora de la movado en Burundo, unu el la plej viglaj landaj movadoj en Afriko, kaj aktiva kunlaboranto pri la tutafrica movado.

Eduardo VIVANCOS (Kanado)

Instruisto kaj varbanto por la movado dum ok jardekoj, inkluzive de la plej malfacilaj kondiĉoj en malliberejoj kaj koncentrejoj; ankaŭ aktiva en Sennacieca Asocio Tutmonda.

WANG Minhao (Ĉinio)

Multjara motora de la movado en Ŝanhajo, talenta instruisto kaj ĉeforganizanto de pluraj internaciaj kongresoj inkluzive de la Internacia Fervoja Kongreso en 2015.

[Gazetaraj Komunikoj de UEA - N-ro 697](#)



De multaj jaroj mi atendis revuon pri krucvorteniĝoj, kaj finfine jen aperas en pdf-formato la

UNUA GAZETO DE ENIGMOJ
ESPERANTE.

La fondinto estas Luca Desiata kaj la redakcia redaktoro Giorgio Denti.

Ĝi estas havebla senkoste per abono en la retejo: www.semajnodeenigmoj.com.

Ĉiumonate vi havos la eblon ĝui ĝin! Cerbumado vigligas la menson kaj ... se vi ŝatas la gazeton, diru al geamikoj!